# Literatur-publica agado de *Karl* GUTZKOW kaj lia romano "Kavaliroj de spirito"

*Tatjana* AVAGJAN

*Karl* GUTZKOW (1811-1878) estis ĵurnalisto, dramverkisto, prozverkisto, kiu lasis videblan spuron en la historio de germana artpensado. Li estis unu el la gvidantoj de la "Juna Germanio", literatura direkto, aperinta en la 30-aj jaroj de la XIX-a jarcento, kaj li multe faris por profesiigi la ĵurnalismon en Germanio. Lia ĵurnalista agado komenciĝis en la jaro 1831, kiam li komencis memstare eldoni en Berlino "La forumon de ĵurnala literaturo", kaj poste li kunlaboris en "Literatura folio" de *Menzel*. Sed baldaŭ li rompas kun *Menzel* pro ideaj kaŭzoj.

En la mezo de la 30-aj jaroj *Gutzkow* estas jam larĝe konata kaj li fariĝas redaktoro de literatura aldonaĵo al la Frankfurta "Fenikso – Printempa Gazeto de Germanio". La publicismo kaj proksimaj ĝenroj iĝas vera profesio de "jungermanianoj", ili laboris cele de "ĉiutaga literaturo", kiu okupiĝis pri plej aktualaj problemoj de la socio, ligante ilin kun estetiko kaj literaturkritiko.

*Friedrich Engels* skribis: "*Gutzkow* estas la plej klara, la plej saĝa el ĉiuj, li verkis pli ol ĉiuj aliaj kaj kune kun *Wienbarg* li montris sian pensmanieron; *Gutzkow* havas grandan publicistan talenton, li estas denaska publicisto".(1) Jungermanianoj, gvidataj de *Gutzkow* kaj *Wienbarg*, strebis batali kontraŭ la reakciaj fortoj en literaturo, filozofio kaj eĉ en politiko. *Gutzkow* en la paĝoj de "Germana revuo" postulas aktivan partoprenon de literaturo en la socia vivo: "Literaturo devas esti spegulo de la nacia vivo. Sendube. Sed ĉu ĝi ne devas ludi pli grandan rolon? Jes, ĝi devas ludi pli grandan rolon".(2)

*Karl Gutzkow* revenas al la sama ideo en "Skizoj pri la historio de moderna literaturo" (1836). Li subtenas la novan arton, ligitan kun interesoj de la nacio kaj de la nuntempo, kun grandaj sociaj problemoj. En sia artikolo "Vero kaj realo" li asertas, ke la misio de la literaturo estas esprimi "la spiriton de sia tempo" (="*Zeitgeist*"), la literaturo devas esti "spegulo de la nacia vivo". *Gutzkow* estas vera germana burĝo-liberalo. Li malakceptas revolucian perforton; por li la popolo estas "blinda homamaso", kiun necesas gvidi kaj instrui. Li estas certa pri la ĉefa rolo de la intelektularo kaj kredas, ke la literaturo estas rimedo de politika edukado de la popolo.



En 1837 *J. Kampe* iĝis posedanto de Frankfurta gazeto "Telegrafo", transportis ĝin al Hamburgo kaj proponis al *Gutzkow* la postenon de ĝia redaktoro. Sub gvidado de *Gutzkow*, la gazeto fariĝis unu el la plej popularaj eldonaĵoj de la literatura opozicio. En la samaj jaroj plifirmiĝas la kontraŭreligiaj kaj demokrataj ideoj de *Gutzkow*. En 1838 aperas lia pamfleto "Ruĝa ĉapo kaj pastra ĉapelo", kiu kontraŭstaras la katolikan reakcion.

En siaj "Leteroj el Parizo" (1842) li skribas pri plilarĝiĝo de sociaj bataloj kaj pri sociaj kontrastoj. Li esperas nun trovi samideanojn ne nur inter la liberpensanta intelektularo, sed en plej larĝaj tavoloj de la germana socio. Sed post la revolucio de 1848 li fariĝas pli modereca liberalisto, kaj dum dek jaroj li eldonas la revuon "Hejmaj konversacioj".

La kulmino de lia verkaro post la revolucio en la jaro 1848 estas la romano "Kavaliroj de spirito" – kunfandaĵo de publicismo, filozofio kaj romanarto. La novaj celoj de la germana literaturo difinas la specifecon de la tuta literatura procezo en Germanio en la komenco de la 50-aj jaroj, ĝian novan kvaliton kompare kun la tuta antaŭa germana literaturo: montri sociajn problemojn de transira periodo, trovi eliron el soci-politika krizo, kontraŭstarigi al tiu epoko sian idealon de harmonia evoluo.

La verko de *Karl Gutzkow* "Kavaliroj de spirito" (1851) estas romano de nova tipo. La aŭtoro provas trovi romanecan formon por iu filozofi-publica tasko, li serĉas diversajn formojn por prezenti multajn politikajn kaj mondkonceptajn problemojn.

*Gutzkow*, pere de novaj formoj kaj metodoj de rakontado, strebas krei praktike kaj argumenti teorie la novan tipon de romano, kiu pro sia formo ricevis la nomon de "*Nebeneinander*" (="unu-apud-la alia") – romano de kunekzistado, aŭ romano de multbranĉa temo. Samtempe, per sia enhavo ĝi estas unu el la plej elstaraj ideologiaj romanoj en Germanio de tiu epoko. Ĝia celo estis respeguli ideologiajn kaj politikajn diskutojn, montri kreajn kaj detruajn elementojn de la moderna historio – unuvorte, la aŭtoro strebis pentri enciklopedian epo-

peon de Prusujo antaŭ kaj post la revolucio, kaj kun tio prezenti senmankan panoramon de la tiutempa vivo.

En la antaŭparolo por la 1-a eldono de "Kaviliroj de Spirito" *Gutzkow* asertas, ke en la nunaj kondiĉoj malnova romano devas cedi lokon al la romano de nova formo, kiu pli adekvate respegulas la nuntempan vivon, kiel jam postulis *Immerman* kaj "la jungermananoj" en siaj romanoj. Tio signifis iom post ioman forlason de la tradicia formo de romano kun "unusola protagonisto" (= "*Einzelheld-Schema*"). La romano devas krei ĉenon de vivsituacioj kaj historiaj epizodoj, kiuj kune respegulus ĉiujn ideologiajn problemojn de la epoko.

La teorio de multbranĉa romano de *Gutzkow* naskiĝis el la bezono, denove revizii malnovajn artprincipojn kaj formojn, kaj, lige kun la nova historia perspektivo de la literatura evoluo, kunordigi ilin kun la ŝanĝoj en la socia vivo, montri la novan formiĝantan burĝan socion kiel tutecon de diversaj sociaj formoj, opinioj, interesoj, kaj tiamaniere esprimi plurecon de la socia konscio, fiksi novajn filozofiajn, politikajn, religiajn tendencojn kaj teoriojn.

Kiel ni jam notis, la junaj germananoj strebis kunigi la literaturon kaj la socian idealon. Dum la politikaj bataloj de 1830 ili konsideris liajn verkojn kiel kritikajn pamfletojn de lia tempo, en kiuj ili atakis la bazojn de ekzistanta sistemo, moralo, religio, ŝtata filozofio. Kritikaj tendencoj tiom predominis en iliaj verkoj, ke romana intrigo, la temo iĝis preskaŭ nur fono aŭ kadro.

La junaj germanianoj evitis pentri komplikajn eventojn de sia tempo en eposaj formoj, ĉar fakte ili pentris sin mem. Ili preferis la formon de leteroj por rekrei la realon kiel pure abstraktan literaturan objekton. Por la jungermanianoj la eposa pentrado de tempo kaj realo ne gravis. Por ili gravis rekta politika agado, kies celo estis la ŝanĝo de la ekzistantaj sociaj cirkonstancoj.

Siavice *Gutzkow* en la antaŭparolo al "Kaviliroj de Spirito" konfesas, ke li agis sub influo de amo al homo ("En niaj nekompreneblaj tempoj mi volis fari ĉenojn el la rozoj kaj repacigi malamon pere de amo".[3] Li serĉis ĉe malsamaj homoj komunajn signojn de nobla kaj humaneca mondkoncepto. Tiamaniere, pere de sia arto, *Gutzkow* strebas trovi pozitivajn perspektivojn por la estonta socio kaj krei socipolitikan utopion, proksiman al realo.



En la romano li pentras vivajn portretojn de siaj samtempuloj el diversaj sociaj tavoloj, kiuj pridiskutas diversajn problemojn; en la multeco de iliaj opinioj *Gutzkow* serĉas multflankan "tempofenomenon" (= "*Zeit-Phänomen*").

La protagonistoj de la romano "Kaviliroj de spirito" estas juristo *Dankmar Wildungen*, lia frato pentristo *Siegbert*, metiisto el Francio *Louis Armand*, pentristo kaj maŝinkonstruisto inĝeniero *Leidenfrost* kaj majoro *von Werdech*. Ili interrilatas iamaniere kun multaj personoj el diversaj sociaj tavoloj. *Gutzkow* strebas rekrei la socian atmosferon de sia epoko, pentri larĝan, senmankan bildon de la realo. En lia romano aperas ĉiuj sociaj tavoloj: metiistoj kaj nobeloj, militistoj kaj servistoj, laboristoj kaj trampoj, pentristoj, pastroj, edukistoj, juristoj, emancipitaj virinoj. *Gutzkow* estas inter la unuaj verkistoj, kiuj strebas krei bildon de "la granda urbo" – Berlino – kiel eposan bildon de la socio, montrantan historian leĝkonformecon kaj la esencon de la vivo.

La protagonistoj estas karakterizataj de historia vidpunkto, iliaj kvalitoj karakterizas precizan historian etapon. Sed samtempe ili evoluas. Por *Gutzkow* la historio ne estas pasinto, sed la formo de homa ekzistado. La tempo en lia romano ne estas rigidiĝinta, ĝi estas moviĝanta historia tempo. Li uzas la temon kaj intrigojn ne nur por doni dinamismon al sia romano, sed antaŭ ĉio por pentri historian panoramon de evoluo de la germana socio de Reformacio ĝis la revolucio de 1848 kaj dum la unuaj postrevoluciaj jaroj por esplori la sferon, kie realiĝas objektiva spirito en la proceso de historia evoluo. Li preferas montri la realon el kultur-historia vidpunkto. Spiritaj serĉoj de protagonistoj estas ligitaj kun la analizo de ĉefaj spiritaj tendencoj kaj la liberiga movado en Germanio.

La humanismo de "Kaviliroj de spirito" havas preskaŭ religian aspekton. La historio malkovras la religion de humaneco. Tio signifas, ke humaneco estas la plej grava bazo de historio, ĝia vero, ĝia celo kaj la esenco de ĝia evoluo. *Gutzkow* estas lernanto de *Hegel* (1770-1831); por li la movanta forto de progreso estas la evoluo de la spirito. En lia romano aperas la ideo de nediskutebla evoluo de "Universa Spirito" (= "*Weltgeist*").

La historio de spirita evoluo estas la historio de la homaro. Komplikaj filozofi-politikaj temoj, kiuj ludas la ĉefan rolon en la romano, difinas ĝian konflikton, ĝian temon, sed same la strukturon de romano kaj la poziciojn de ĉiuj personoj.

Por montri etapojn de la spirita evoluo, la aŭtoro enkondukas multajn historiajn personojn, asociojn, unuiĝojn. En la romano aperas altspiritaj homoj: *Johann Baptisto, J. de Molays, Hugo von Wildungen*. La idea kaj historia kromteksto malkovriĝas pere de multaj aludoj kaj referencoj al spiritaj kavaliraj ordenoj de Mezepoko, al jezuitoj kaj framasonoj, al la ĝenerala situacio de sekretaj politikaj unuiĝoj, kreitaj por plifortigi reakciajn fortojn post la jaro 1848.

Por la protagonistoj, la precipa problemo estas la disiĝo de utopiaj teorioj kaj socia realo. La "Kavaliroj de spirito" gardas sian unuiĝon nur rifuzante ĉiujn politikajn agojn. Aplikante la ideojn de *Hegel* al la nuntempa Germanio, *Gutzkow* asertas, ke la sorto de la socio dependas rekte de la Universa Spirito, kiu estas en la bazo de socia proceso, kaj la memperfektiĝo de Spirito efektiviĝas pere de morala perfektiĝo de ĉiu aparta portanto de la spirito – ĉiu germano de tiu epoko. *Gutzkow* kaj liaj personoj denove sekvas la jungermanianojn, kiuj same esperis reformi la socion pere de ideo, de la pozicioj de la klerigita klaso, enkorpiganta en si superan spiritecon de la socio.

Laŭ *Gutzkow* la kavaliroj pravas rifuzante aktivan historian agadon kaj elektante pasivan reziston, internan elmigron; li transportas gravajn sociajn problemojn en la sferon de la Spirito. Same kiel *Hegel* li opinias, ke la homo povas esti libera nur en la Spirito, nur en ĝi malaperas ĉiuj sociaj kaj politikaj problemoj. *Gutzkow* revas, per la filozofio de *Hegel* kaj de la arto en ilia sintezo konduki la malfeliĉan homaron al harmonio, en mondon de socia utopio.

**Notoj**

(1) *Marx K. & F. Engels: "Soĉinenija"*, v.1, p.481; *F. Engels, Aleksandr Jung: "Lekcii o sovremennoj literature nemcev"*.
(2) "*Die Deutsche Revue*, 1835" (La Germana Revuo, 1835): *Hrsg. Karl Gutzkow & L. Wienbarg*, 1904, S. 32.
(3) *Gutzkow K.: "Die Ritter vom Geiste"*, Antaŭparolo de la 3a eldono (*Vorwort zur 3.Auflage*), 1854, S. XIV.

**Aŭtora adreso**
*D-ro AVAGJAN Tatjana*
*Lesnoj Projezd, d. 8, kv. 28.*
*Rossia, Baŝkiria, 450071, U f a* – 71 / RUSIO
*Tel. : (7-3472)- 32 - 75 - 52*

**Priaŭtora informo**
La aŭtorino estas doktoro pri filologio kaj laboras ĉe Baŝkiria Ŝtata Universitato, *Ufa*, Rusio.



## Scienca elio

### Hundosaluto

Ĉe la kvazaŭ homeca kondutmaniero, en kiu interrilatas hundo kaj hundoposedanto, ni certe taksas memkontente kiel ĝojesprimon al ni persone, kiam nia hundeto alten saltas kontraŭ niaj gamboj. Sed tio estas ne pli ol hundosaluto kaj formo de sindonemo. Lupoj kaj hundoj salutas la pli altrangan samspeculon per tio, ke ili provas – de malsupre – alpuŝi la aliulan kapon kaj leki ties buŝon.

Laŭ tiu praa hundomaniero nin nun salutas nia hundeto – kvazaŭ sian pli altan rangulon. Ĉar nia homa buŝo estas konstruita tiom alte for de niaj piedoj, nia povra kvarpieda kamarado ne havas alian eblon ol salti kaj grimpe saluti nin hundmaniere... (2003-07-02)

### Esenco de la grundo

En niaj regionoj hejmas 33 specioj de lumbrikoj. *Charles Darwin* elkalulis, ke en angla herbejo sur 1000 kvadratkilometroj ĉeestas 67 250 tiuj tervermoj. En Germanujo kontraŭe estis kalkulitaj por samgranda areo pli ol 20 milionoj! Per ingesto kaj eliminado de tero ili ĝin malkompaktigas, tiel, ke oksigeno kaj akvo pli bone distribuiĝas en la grundo. Niaj eŭropaj lumbrikoj estas inter 2 cm kaj 30 cm longaj – en Afriko estas lumbrikospecioj, kiuj (dikaj kiel polekso) kreskas ĝis longo de 2 metroj. Sekigite ilia fekaĵostako pezas preskaŭ duonan kilogramon. En la valo de la "Blanka Nilo" sur milkvadratmetra areo dumnokte lumbrikoj trafosas entute ĉ. 55 kilogramojn da grundo. (2003-07-21)

### Burdo kaj trifolio

Kiam *Joseph Gottlieb Kölreuter* (1733-1806) en la jaro 1761 atentigis pri la graveco de la polenado per insektoj dum generado de plantoj, li nur fariĝis objekto de rideto kaj mokado, kaj estis alfrontita de ĝenerala nekredemo kaj moko. Nur en la 19-a jarcento li estis science pravigata.

Ke kelkaj plantoj sen difinitaj insektospecioj tute ne kapablas generadi, tion spertis la fruaj setluloj en Aŭstralio. Ili importis kiel nutroplanton por siaj ŝafoj kaj bovoj ruĝan trifolion, kiu tamen ne produktis semaĵon, ĉar en Aŭstralio mankis burdoj. Fine oni importis kaj liberigis eŭropajn burdojn. Ekde tiu tempo, la trifolio kreskas kaj generas "kvazaŭ tute ne-helpate". (2003-07-12/13)